

Joseph Freiherr von Eichendorff,

Nokte

tradukita de Cezar

Mi migras tra la noktkviet',
 Ŝteliras ofte en sekret'
 jen Lun' el nigra nubkovrilo.
 Kaj tie, ĉie en la val'
 Vekiĝas najtingal',
 Kaj poste reas griz', trankvilo.

Ho vi mirinda noktkantad':
 El for' tra l' land' riverplaŭdad'.
 Sub nigraj arboj eĉ trem-plonĝo
 Konfuzas pensojn ĝi.
 Freneze kantas mi,
 Jen kvazaŭ voko nur el sonĝo.

*Traduko de la Germana poemo "Nachts" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de CEZAR (civila nomo: Hans-Georg Kaiser, *1954-05-21).*

Arg-1069-2158 (2014-06-27 22:00:11)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://cezartradukoj.blogspot.de/2012/12/josefo-de-eichendorff-kristnasko.html#!2013/06/josefo-de-eichendorff-nokte-rimpoemo.html>.